**PASKA DIMANĈO - 24an de aprilo 2011**

**LI DEVOS RELEVIĜI EL LA MORTINTOJ**

**Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

***Jo 20,1-9***

***La unuan tagon de la semajno frumatene, Maria Magdalena iris al la tombo de Jesuo dum estis ankoraŭ mallume, kaj vidis la ŝtonon forigita de la enirejo de la tombo.***

***Ŝi do kuris al Simon Petro kaj al tiu alia disĉiplo, kiun Jesuo amis, kaj diris al ili: "Oni forprenis de la tombo la Sinjoron, kaj ni ne scias kien oni Lin metis". Eliris do Petro kaj la alia disĉiplo, kaj iris al la tombo. Ambaŭ kuris kune, sed la alia disĉiplo kuris antaŭe, pli rapide ol Petro, kaj unua alvenis al la tombo. Kliniĝinte, li enrigardis, li vidis la tolaĵojn kuŝantaj, tamen li ne eniris.***

***Kiam Simon Petro, sekvante lin, alvenis, li eniris en la tombon; kaj li vidis la tolaĵojn kuŝantaj kaj la mortotukon, kiu estis sur lia kapo, ne kuŝanta kun la tolaĵoj, sed kunvolvita en aparta loko.***

***Tiam eniris ankaŭ la alia disĉiplo, kiu unua alvenis al la tombo: li vidis, kaj ekkredis. Ĉar ili ankoraŭ ne komprenis tion, kion diras la Skriboj, tio estas ke Jesuo devos releviĝi el la mortintoj.***

Se Maria Magdalena estus irinta al la tombo unu tagon pli frue, ni celebrus la Paskon unu tagon pli frue. Skribas Johano en la ĉapitro 20: "*La unuan tagon de la semajno*", laŭvorte "la unuan post la sabato", "*Maria Magdalena iris al la tombo*". Kial Maria Magdalena ne iris al la tombo tuj post la entombigo de Jesuo, sed ŝi atendis la unuan tagon post la sabato? Ĉar ŝi estas ankoraŭ kondiĉita de la observado de la leĝo de la ripozo en sabato.

Kaj do la observado de la leĝo malebligis tuj eksperimenti la potencon de la vivo kiu estis en Jesuo, vivo kapabla superi la morton. La evangeliisto, pere de tiu indiko, volas montri al siaj legantoj ke la observado de la leĝo malfruigas la eksperimentadon de la nova kreado kiu estas inaŭgurata de Jesuo.

La dirmaniero "la unua de la semajno" memorigas fakte la unuan tagon de la kreado. En Jesuo estas nova kreado, tiu vere kreita de Dio kiu ne konas la morton, kiu ne konas la finon. Sed la komunumo,

reprezentata de Maria Magdalena, estas ankoraŭ kondiĉita de la observado de la leĝo. Pro tio ŝi malfruigas la sperton de la releviĝo.

*"Ŝi iris al la tombo de Jesuo dum estis ankoraŭ mallume".* Mallumo estas la bildo de la nekompreno de la komunumo kiu ankoraŭ ne komprenis Jesuon, kiu sin difinis "lumo de la mondo", lian mesaĝon, lian veron. "K*aj vidis la ŝtonon forigita de la enirejo de la tombo.*". Nu la unua reago de Maria Magdalena estas kuri al Simon Petro kaj "*al la alia disĉiplo*". Jesuo estis dirinta "*Venas la horo kiam vi disperdiĝos, ĉiu laŭiros sian vojon".*

Nu la evangeliisto atribuas al tiu virino, Maria Magdalena, la rolon de la paŝtisto kiu rekunigas la ŝafojn kiuj disperdiĝis. "*Kaj diris al ili: Oni forprenis de la tombo la Sinjoron, kaj ni ne scias kien oni Lin metis* ***".*** Ŝi ne parolas pri korpo, sed pri la Sinjoro. Kaj do jam estas aludo ke tiu Jesuo estas vivanta. Nu Petro kaj la alia disĉiplo kion ili faras? Ili iras al la tombo, la nura loko kien ili ne devus iri.

En la evangelio de Luko estos eldirite tre klare de la homoj kiuj bremsas la virinojn kiuj iras al la tombo: "*Kial vi serĉas inter la mortintojn tiu kiu estas vivanta?"*. Do Petro kaj la alia disĉiplo iras serĉi la Sinjoron en la ununura loko kie li ne estas, tio estas en la loko de la morto. Samkiel Maria, la observado de la sabato malfruigis la sperton de iu vivo pli forta ol la morto,  ĉar Jesuo ne povas esti retenita en la tombo, loko de morto.

Li estas vivanta. Tiel la disĉiploj iras al la tombo, la ununura loko kie ne povas esti Jesuo. Se oni priploras la personon kiel mortintan, tio estas se oni sin adresas al la tombo, oni ne povas tiun sperti viva kaj viviga en la propra ekzisto. Kuras ambaŭ disĉiploj, alvenas unue la amata disĉiplo, tiu kiu havas la sperton de la amo de Jesuo.

Petro, kiu rifuzis lavigi al si la piedojn kaj do ne volis akcepti la amon de Jesuo esprimitan en la servado, alvenas pli malfrue. Sed la alia disĉiplo haltas kaj permesas ke estu Petro la unua eniranta. Kial? Gravas ke la disĉiplo kiu perfidis Jesuon kaj por kiu la morto estas la fino de ĉio – kaj tio estis la kialo de la perfido – faru unua la sperton de la vivo.

Kaj poste eniras ankaŭ la alia disĉiplo, "*li vidis, kaj ekkredis.".* Sed la tre grava admono de la evangeliisto estas ke *"ili ankoraŭ ne komprenis tion, kion diras la Skriboj, tio estas ke Jesuo devos releviĝi el la mortintoj".* La zorgo de Johano estas ke oni povas kredi al la releviĝo de Jesuo nur vidante la signojn de ilia venko super la morto. Ne!

La releviĝo de Jesuo ne estas privilegio donita al iuj personoj antaŭ dumil jaroj, sed estas ebleco por ĉiuj kredantoj. Kiel? Tion diras la evangeliisto. "*Ili ankoraŭ ne komprenis tion, kion diras la Skriboj, tio estas ke Jesuo devos releviĝi el la mortintoj".* La akcepto de la Skriboj, la vorto de la Sinjoro, en la disĉiplo, la enradikigo de tiu mesaĝo en lia vivo, kaj lia transformiĝo, permesas al la disĉiplo havi iun vivon de tiela kvalito kiu sentigas al li la releviĝinton en lia ekzisto.

Oni ne kredas ke Jesuo releviĝis, ĉar estas malplena tombo, sed nur se oni lin renkontas viva kaj viviga en propra vivo.